


printempa semajno internacia
germana esperanto asocio - <https://psi.esperanto.de>

38a PSI

la paska renkontiĝo por la tuta familio



cc-by-sa <https://www.Live-Karikaturen.ch>

... eble sub „2G“- aŭ „3G“-reguloj ...

Braunschweig, Malsupra Saksio

11-a de aprilo – 18-a de aprilo 2022

Germanio

PSI - printempa semajno internacia



estas granda internacia renkontiĝo por la tuta familio. Ĝi okazas ĉiujare dum unu semajno ĉirkaŭ pasko ie en Germanio. Por la 38a PSI ni atendas ĉirkaŭ 100 partoprenantojn el multaj landoj. Kutime kvarono ĝis triono estas infanoj aŭ junuloj.

familioj

PSI estas precipe familia seminario. La programo celas kontentigi samrajte plenkreskulojn, junulojn kaj infanojn. Sed tio ne ekskluzivas unuopulojn, ĉiu estas bonvena.

infanoj

Okazas apartaj programeroj por infanoj laŭ aĝo kaj lingvokono. Kaj komencantoj kaj flue parolantoj havos sian programon. Gepatroj do havas bonan okazon trankvile partopreni siajn programerojn sen infanoj - aŭ kun la infanoj, se ili preferas.

junuloj

Ni ankaŭ ofertas specialajn progampartojn por junuloj inter 10 kaj 16 jaroj, kiuj almenaŭ iomete parolas la internacian lingvon. Ili povas loĝi en komunaj ĉambroj kaj lernas, ludas kaj festas kune.

komencantoj

Se vi aŭ via partnero aŭ ambaŭ estas komencanto(j) aŭ eĉ neesperantisto(j), ne timu. Vi estas bonvenaj! Ni aranĝas kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Sed ankaŭ aliaj programeroj konsideras la komencantojn.

programo

La seminario enhavas kaj laborajn kaj distrajn elementojn por ĉiuj aĝoj. Certaj programeroj iĝis jam tradiciaj:

- ◆ diskutgrupoj kaj prelegoj pri plej diversaj temoj
- ◆ kursoj pri ludoj, dancoj, kantoj, muziko, ...
- ◆ lingvokursoj por komencantoj, progresintoj
- ◆ Mazi-kursoj ĉiutagaj por infanoj
- ◆ nacilingvaj kursetoj parolantoj de diversaj lingvoj prezentas sian lingvon en mallonga kurseto.
- ◆ artaj manlaboroj pri ornamaĵoj, pentrado, ŝtofoj, origamio, ...
- ◆ ekskursoj al vidindaĵoj en la regiono kaj najbaraj urboj
- ◆ paskonokta diservo
- ◆ filmoj kelkfoje vi povas spekti filmojn
- ◆ vespera kultura programo koncertoj, prezentaĵoj, magio, ...
- ◆ kafejo – trinkejo – babilejo ĉiutage malfermita
- ◆ amaso da ludoj
- ◆ kostuma balo (temo **bestoj**)
- ◆ ovoserĉado
- ◆ fotokonkurso
- ◆ multaj sportaktivecoj
- ◆ **kaj ... eble via oferto ...**

La organiza teamo bezonas helpon dum la PSI-semajno.

(prelegoj, knajpo, kafejo, ekipo de la seminariejoj, transporta servo ktp.)

Bonvolu indiki vian pretecon en la aliĝilo – dankon!

Braunschweig

Braunschweig [braŭnŝvajk], esperantlingve Brunsvigo, estas urbo en la germana federacia lando **Malsupra Saksio** (*Niedersachsen*). Ĝi estas centro de la regiono oriente de **Hanovro** kaj post ĝi dua urbo laŭ grandeco de **Malsupra Saksio**. La skribita historio de Brunsvigo komenciĝis en la 8-a jarcento. Ĝi apartenis kiel unu de la plej gravaj urboj al la komerca ligo **Hanso** en la mezepoko, sed ne povis daŭrigi tiun ĉi gravecon. Unu kaŭzo estis la geografia situacio inter **Hanovro** kaj **Berlino** kiuj ambaŭ kreskis pli rapide. Dum la lastaj pli ol cent jaroj Brunsvigo estis industria centro. Hodiaŭ la sciencoj kaj la edukado estas pli elstaraj. Brunsvigo, **Wolfsburg** kaj **Salzgitter** kunlaboras komunume kaj formas unu de la regionaj centroj de Malsupra Saksio.



fonto de la teksto: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Braunschweig>, fotoj de <https://braunschweig.jugendherberge.de/>



La domo



fonto de bildo: paĝaro de junulargastejo <https://braunschweig.jugendherberge.de/>

Jugendherberge Braunschweig

Wendenstr. 30
38100 Braunschweig
Tel. **0531 8668850**
Fax 0531 86688529
braunschweig@jugendherberge.de



Bonvenon en la Löwenstadt, leona urbo, Braunschweig!

La nove malfermita junulargastejo Braunschweig estas unu el la plej modernaj junulargastejoj de norda Germanio kaj ideala elirpunkto por niaj esploroj kaj ekskursoj. Ĝi havas 168 litojn kaj 5 familiajn ĉambrojn. Ĉiu ĉambro havas propran duŝon kaj necesejon. Krom tio la domo disponas pri granda manĝejo kaj 5 seminariejoj kun taga lumo. La domo ofertas libertempajn aktivecojn, kiel tablotenis kaj bilardo. Vi povas starigi viajn biciklojn en la supertegmentita kaj barita bicikla korto. Kaj la novspeca kuirejo kaj la proksimeco al la historia urbo Braunschweig invitas al plurtagaj seminarioj kaj renkontiĝoj.

Domo ĉe google-maps

Kotizoj	plurlita ĉambro	dulita ĉambro	unulita ĉambro
0 - 2 jaroj	0 €	0 €	
3 - 5 jaroj	190 €	210 €	
6 - 12 jaroj	230 €	300 €	
13 - 26 jaroj	300 €	400 €	550 €
pli ol 26 jaroj	400 €	480 €	550 €
	La kotizoj inkluzivas loĝadon, 3 manĝojn tage kaj endoman programon. Ekskursoj estas surloke aparte pagendaj. Materialon por manlaboroj oni pagas laŭ uzita kvanto surloke.		
rabato por fruegaj birdoj	aliĝo jam dum la antaŭa PSI: 5 € por ĉiu plenkreskulo kaj tago		
rabato p. eksterlandanoj (kiuj ne loĝas en Germanio)	20 € por plentempa partopreno de plenkreskuloj		
partopreno sen manĝo kaj	sen ĉambro/lito: 100 € por la tuta semajno		
partatempa partopreno	ni kalkulas la plentempan kotizon dividita per 6 oble la tranoktoj		
subvencioj	por partoprenantoj el nepagipovaj landoj eblas rabatoj laŭ niaj financaj ebloj kaj eventuala programkontribuo. Bonvolu priskribi vian eblan programkontribuon. Oficialajn invitilojn ni sendos nur post interkonsento.		
krompagoj	por malfruaj aliĝoj/antaŭpagoj ekde 10-a de januaro 2022: 10 € por ĉiu persono ekde 1-a de februaro 2022: 15 € por ĉiu persono ekde 1-a de marto 2022: 20 € por ĉiu persono		
aliĝkondiĉoj	<p>post la reta aliĝo kaj la aŭtomata retpoŝta konfirmo vi ricevos fakturon. Por daŭra rezervado de la ĉambro(j)/lito(j) deklaritaj en la fakturo, vi devas antaŭpagi minimume 50 % de la tutaj kostoj dum la tempo menciita en la fakturo. La resto de la kotizoj devas esti pagitaj plej malfrue ĝis la 15-a de marto 2022 (eniro de la pago sur la konto de GEA) aŭ - se ne eblas alimaniere - kontante je la komenco de PSI.</p> <p>Malaliĝo ĝis la 31-a de januaro 2022: la tutaj jam pagitaj kostoj minus 10 € estos repagataj. Post tiu dato ni nur povas repagi la tutajn jam pagitajn kostojn minus 20 €, nur se ni aŭ la domo sukcesos okupi via(j)n ĉambro(j)n/lito(j)n per aliaj gastoj, alikaze ni povas repagi nur la jam pagitajn kostojn minus la antaŭpagon de 50 % de la tutaj kostoj. En kazo de malsano kaj simile ni kutime repagos la plenajn jam pagitajn kostojn.</p>		

Bonvolu aliĝi per
<https://psi.esperanto.de/2022>



aliĝoj kaj informoj

Germana Esperanto-Asocio

<http://psi.esperanto.de> kaj psi@esperanto.de

Telefono: +49-(0)800 3 36 36 62

pagoj al

Sparkasse Odenwaldkreis / Deutscher Esperanto-Bund

IBAN kodo: DE84 5085 1952 0040 1146 05

BIC kodo: HELADEF1ERB

aŭ

Se vi volas pagi per **PayPal**, bonvolu kontakti nin.

Bonvolu nepre ĝiri kun titolo: PSI 2022 + [Antaŭpago/Kotizo] + VIA NOMO

Bonvolu ne plu ĝiri al UEA